

Kostenloser Esperanto-Kurs - 8. Lektion

Wahrscheinlich haben die anderen Menschen in deiner Stadt oder deinem Ort, die Esperanto sprechen, neben ihren internationalen Kontakten wenig regelmäßige Verbindungen untereinander. Oder es gibt einige junge Leute in etwa deinem Alter, die sich ab und zu locker treffen. Vielleicht aber wohnst Du auch in einer Stadt, wo es einen richtigen traditionellen Esperanto-Klub mit „Veteranen“ gibt, die die internationale Sprache schon vor Jahrzehnten gelernt haben. Der folgende Text schildert in etwas ironischen Worten, wie Peter zum ersten Mal den sehr traditionsbewussten Esperanto-Klub seiner Stadt besucht.

1. GRAVA MOMENTO

- Kara Peter, ni ĝojas, ke vi membriĝis en nia Esperanto-klubo. Verŝajne vi jam aŭdis de Klara, ke ni estas unu el la plej famaj kluboj de la lando, fondita antaŭ pli ol sep jardekoj (jar-dek-oj). Jam mia praavo staris antaŭ tiu ĉi nigra tabulo, kun blanka kreto en la mano, instruante Esperanton. Mi memoras la tagon, kiam li kun entuziasmo gvidis la klubon kaj agis por disvastigi Esperanton en nia urbo kaj la ĉirkaŭaj vilaĝoj. Bedaŭrinde li nun estas malsana kaj jam ne povas veni.

Klara turnas sin al Peter kaj flustras en lian oreilon:

- Iam ni estis preskaŭ familia klubo, ĉar membriis krom lia praavo eĉ lia bofrato kaj lia eksedzino.

Ridetante la klubestro daŭrigas:

- Mi scias, ke Klara nun fiflustris pri mia familio. Sed, karaj, vi ja scias, ke la persona agado de unuopuloj ĉiam ludis gravan rolon en Esperantujo. Mi memoras la tempon, kiam ni sidis ĉi tie nur kvarope aŭ kvinope, sed dank' al la tiama fidela sindonemo de la membroj, al ilia mirinda entuziasmo, ni altiris tiun grandan nombron da homoj interesiĝantaj pri Esperanto kaj uzantaj nian lingvon dum vojaĝoj kaj en la korespondado kun landoj en ĉiuj anguloj de la mondo: en nordo, sudo, oriento kaj okcidento. Kiam vi envenis nian ĉambron, Peter, vi preteriris ŝrankon kun valoraj objektoj el nia kluba vivo, kaj super la ŝranko pendas malnova foto de doktoro Zamenhof. Tiujn ĉi valorajojn apartenantajn al la klubo ni montros al vi, poste. Nun, Peter, mi elkore bonvenigas vin en nia rondo kaj transdonas al vi tiun ĉi insignon: verdan stelon kun la litero 'E' en la mezo. Ĝi estas la signo de nia esperantista komuneco. Neniam forĵetu ĝin, ĉar laŭ ĝi, oni rekonas vin en la tuta mondo kiel esperantiston. Ĝoju fariĝi membro de amikeca internacia societo. Karaj samideanoj, levu la glasojn kaj trinku je la sano de nia novalveninto (nov-al-ven-int-o).

Klara prenas sian vinglason dirante al Peter:

- Li estas lerta parolanto kaj granda idealisto. Liaj sukcesoj montras, ke li ofte pravas. Kaj ĝuste pro tio ni reelektis lin kiel nian estron.

2. NEUE WÖRTER

Erschließe Dir: momento, entusiasmo, rolo, korespondi, nordo, sudo, ŝranko, objekto, doktoro, idealo.

agi	handeln	montri	zeigen
bofrato	Schwager	nombro	Anzahl
ĉefo	Leiter, Chef	okcidento	Westen
dank' al	dank (+Dativ)	orelo	Ohr
daŭrigi	fortsetzen, fortfahren, weitermachen	oriento	Osten
disvastigi	verbreiten	praavo	Urgroßvater
eksedzino	geschiedene Frau, Ex-Frau	pravi	recht haben
elekti	wählen	preter	vorbei (an)
Esperantujo	Welt, in der Esperanto gesprochen wird (wörtlich: Esperantoland)	rideti	lächeln
estro	Leiter, Chef	ridi	lachen
fidela	treu	samideano	(sam-ide-an-o) Anhänger der gleichen Idee (so sprechen sich sehr traditionsbewusste Esperanto-Sprecher untereinander an)
fiflustr	verächtlich flüstern	sana	gesund
flustr	flüstern	signo	Zeichen
fondi	gründen	sindonemo (sin-don-em-o)	Hingabe
glaso	Glas	societo	Gesellschaft (Freundeskreis u.ä.)
ĝoji	sich freuen	socio	Gesellschaft (eines Landes)
gvidi	leiten	stelo	Stern
insigno	Abzeichen	super	über
interesiĝi pri	sich interessieren für	tabulo	Tafel
jam ne	nicht mehr	tiri	ziehen
jardeko	Jahrzehnt	transdoni	Übergeben, überreichen
ĵeti	werfen	unuopulo	einzelner
klubestro	Klubleiter, Klubchef	uzi	nutzen
komuneco	Gemeinsamkeit	valora	wertvoll
kreto	Kreide	vasta	weit, breit
kvarope	zu viert	Zamenhof	Ludoviko Lazaro Zamenhof (geb. 1859 in Bialystok, heute Polen, gest. 1917 in Warschau; jüdischer Augenarzt, Autor des Esperanto)
kvinope	zu fünft		
lerta	geschickt		
litero	Buchstabe		
membro	Mitglied		
memori (+Akk.)	sich erinnern (an)		
mirinda	bewundernswert		

Redewendungen:

jam ne (ab jetzt) nicht mehr
Levu la glasojn! Erhebt die Gläser!

Je via sano!

Auf euer (dein, Ihr) Wohl!

3. GRAMMATIK

3.1 (Wiederholung:) Die Endung -n als Kennzeichen für eine Richtungsangabe

Berlinon - nach Berlin

urben - in die Stadt

Wird das Wort oder die Wortgruppe, die die Richtung anzeigt, durch eine Präposition eingeleitet, so steht die Richtungsendung -n nur nach solchen Präpositionen, die zweideutig sind, d.h. sowohl einen Ort als auch eine Richtung bezeichnen können.

Diese zweideutigen Präpositionen sind: antaŭ (malantaŭ), apud, ĉirkaŭ, ekster, en, inter, post, sub, super, sur, tra, trans.

Immer **ohne** nachfolgende Richtungsendung -n, da bezüglich der Richtung immer eindeutig in ihrer Bedeutung sind die Präpositionen: al, ĉe, ĝis, laŭ, preter.

Beispiele:

- zweideutige Präpositionen: Ort (wo?) Richtung (wohin?)
 - esti antaŭ la urbo / veturi antaŭ la urbon
 - stari apud la ŝranko / iri apud la ŝrankon
 - kreski ĉirkaŭ la domo / kuri ĉirkaŭ la domon
 - sidi ekster la ĝardeno / veni ekster la ĝardenon
 - lerni en la lernejo / iri en la lernejon
 - stari inter la aŭtoj / veturi inter la aŭtojn
 - stari post la knabino / kuri post la knabinon
 - serĉi sub la tablo / ĵeti sub la tablon
 - pendi super la ŝranko / pendigi super la ŝrankon
 - kuŝi sur la seĝo / meti sur la seĝon
 - iri tra parko (kreuz und quer) / iri tra parkon (gerade hindurch)
 - stari trans la strato / iri trans la straton
- eindeutige Präpositionen: wo? wohin/woher?
 - stari ĉe la muro / iri al teatro
 - kuri laŭ la strato / kuri ĝis la fino
 - iri preter la domo / veni el la domo

Natürlich können alle diese Präpositionen auch als Vorsilbe für Verben (u.a. Wortarten) verwendet werden. Wenn nach diesen Verben die Präposition nicht wiederholt wird und auch keine andere Präposition steht, dann folgt in jedem Fall der Akkusativ:

iri laŭ la konstruaĵo - laŭiri la konstruaĵon - laŭiri laŭ la konstruaĵo (entlang des Gebäudes gehen)

veni el la ĉambro - elveni la ĉambro - elveni el la ĉambro (aus dem Zimmer kommen)

3.2 Beachte den Akkusativ nach „kiel“

La estro bonvenigis lin kiel amiko. - Der Leiter begrüßte ihn wie ein Freund: Hier bezieht sich „amiko“ auf „estro“.

La estro bonvenigis lin kiel amikon. - Der Leiter begrüßte ihn wie einen Freund: Hier bezieht sich „amikon“ auf das Akkusativobjekt „lin“ und erhält daher auch die Akkusativendung -n.

3.3 Die Präposition „je“

Die Präposition „je“ wird normalerweise immer dann gebraucht, wenn keine andere Präposition passt. Sie selbst hat keine besondere Bedeutung:

Je kiu horo li alvenis? - **Zu** welcher Uhrzeit kam er an?

Je via sano! - **Auf** Dein Wohl!

3.4 Wortbildung:

Präfixe:

- pra- (Ur-): **praavo**, **pranepo**, **prahomo**
- dis- (auseinander, zer-): **disfali**, **disvastigi**
- bo- (Verwandtschaft durch Heirat): **bofrato** (Schwager), **bopatrino** (Schwiegermutter)
- eks- (Ex-, ehemalig): **eksedzo**, **eksĉefo**
- fi- (bringt eine moralisch verächtliche Meinung des Sprechers zum Ausdruck): **fihomo/fiulo** (Lump). **fi!** (pfui!)

Suffixe:

- -ind- (-wert, -würdig): **salutinda** (begrüßenswert), **mirinda** (bewundernswert)
- -estr- (-leiter, -chef): **fakestro** (Abteilungsleiter), **lernejestro** (Schulleiter)
- -op- (an Zahlwörter angehängt: zu wievielt): **kvarope** (zu viert), **kvaropo** (eine vierköpfige Gruppe), **unuopa** (einzeln), **unuopulo** (einzeln)
- -em- (Neigung zu ..., Lust auf ...): **laborema** (arbeitsam), **parolema** (gesprächig)
- -ec- (betont die Eigenschaft): **bona** (gut) - **boneco** (Güte); **beleco** (Schönheit)

4. ÜBUNGEN

Bilde aus zehn esperantosprachigen Beispielen aus 3.1. je einen Satz und übersetze ihn ins Deutsche.

Wenn du den folgenden Text am Bildschirm liest, kannst du die unterstrichenen Verknüpfungen anklicken und bei geeigneter Internetverbindung die entsprechenden Lieder gleich auf youtube anhören.

5. MUZIKO EN ESPERANTO

Aŭskultinte kelkajn anekdotojn kaj rakontojn, Peter pluesploras la klubejon. En angulo li vidas aron de kompaktdiskoj kun Esperanto-muziko.

- Klara, vi ne diris al mi, ke en Esperanto ekzistas ankaŭ muziko!
- Peter, mi ankaŭ ne diris al vi, ke en Esperanto ekzistas poemoj.
- Ah, ĉu ekzistas?
- Certe, muziko ja estas ofte kantata poemo, ĉu ne? Ekzistas eĉ diskeldonejo, kiu eldonas nur esperantlingvan muzikon. Ĝi nomiĝas [vinilkosmo](#). Sed eble ni simple aŭskultu iomete. Jen estas iom trista kanto, kiun mi ŝatas. Mi plibonigis mian Esperanton per ĝi, ĝi estas ne tiom malfacile komprenebla. [Aŭskultu!](#)

Berlino sen vi

Se vi dirus tion pli frue,
eble mi irus ĝis la stacidom'
repremi mian monon forgesi pri la vojo.
Se vi dirus tion pli klare,
eble mi ne agus kiel metronom'
kaj aŭskultus vian voĉan sonon por la unua fojo

Berlino sen vi estas urb' sen harmoni'
estas trista trista amasloĝej'.
Berlino sen vi lasas min sen energi'
en la trista trista amasloĝej'.

Se vi dirus tion pli frue, eble mi irus ĝis la flughaven'
por aĉeti biletojn por ambaŭ ni.
Se vi dirus tion pli klare eble mi vivus sen tiu ĉagren',
nun aŭskultus vian voĉon kun emoci'.

Ho mia pejzaĝ' de trista amasloĝej'.
Urba vizaĝ' neniam iĝos la hejm'
de mia plej kara dezir'

Se vi dirus tion pli frue eble mi restus en tiu vilaĝ'
kaj ne indus komenti kial Petro iris for.

Ekzistas multaj aliaj kantoj en Esperanto, kaj modernaj kaj malnovaj. En *youtube* vi povas spekti kelkajn kun teksto. Verŝajne kelkajn vortojn vi ne konas, sed ne gravas, se vi ne ĉion komprenas. Ĉio ĉi simple informu vin pri la granda diverseco de Esperanto-muziko. Jen eta superrigardo. Se vi volas, vi povas ankaŭ aŭskulti la kanton per la interreto, alklakante la ligilojn en la pdf-dosiero.

- La kanto [Berlino sen vi](#) estas de *inicialoj DC*. Li ankaŭ faras pli gajajn kantojn, ekzemple [Kurso de Esperanto](#)
- *Persone* estas unu el la plej famaj Esperanto-rokgrupoj. Unu tre konata kanto de ili estas [Liza Pentras Bildojn](#).
- *La Perdita Generacio* estas idealistoj el Svedujo, kiuj kritikas troan komercemon kaj propagandas amon. Jen tre kaj eble tro dolĉa [amokanto](#) de ili.
- [Nova Kanto](#) estas „verda“ hiphopo de *Tone* el Brazilo, kiu entuziasme prikantus Esperanton. Sed ekzistas ankaŭ la malo, nome „krima“ hiphopo de la franca grupo *La Pafklik'*, kiu primokas iom Esperantistojn.



6. NEUE WÖRTER

amasloĝejo	Massenunterkunft, Turnhalle	klaki	klicken
ambaŭ	beide	komenti	kommentieren
aŭskulti	anhören, zuhören	lasi	etw. oder jmd. Lassen
bileto	Fahrkarte	ligi	verbinden
ĉagreno	Ärger	ligilo	Link, Verknüpfung
deziro	Wunsch	pejzaĝo	Landschaft
diskeldonejo	Plattenfirma	pentri	malen
dolĉa	süß	primoki	sich lustig machen über
ekrano	Bildschirm	sono	Klang
emocio	Gefühl	stacidomo	Bahnhof
entuziasma	enthusiastisch, begeistert	superrigardo	Überblick
esplori	erforschen	trista	traurig
fama	berühmt	urbo	Stadt
flughaveno	Flughafen	verda	grün
generacio	Generation	vilaĝo	Dorf
hejmo	Heim	vizaĝo	Gesicht
kanto	Lied	voĉo	Stimme

7. KONTROLLÜBUNGEN FÜR DEINEN MENTOR

7.1 Traduko

Übersetze nur unter Verwendung und evtl. Kombination

- der Präfixe pra-, dis-, eks-, fi-,
- der Suffixe -ul-, -iĝ-, -estr-, -ec-, -ind-, -em-,
- sowie der entsprechenden Endungen (-a, -e, -o, -i)

folgende Wörter auf Esperanto:

1. Vorfahre
2. auseinander
3. ausscheiden (aus der Firma, dem Verein, usw.)
4. (moralisch) schlecht
5. leiten
6. Eigenschaft
7. würdig sein
8. Lust

7.2 Ripeto de la akuzativo. Enmetu la finaĵon -n kie necesas

1. La knabino_ ne ŝatas viando_.
2. La biciklo_ apartenas al mi_.
3. La libro_ falis sub la lito_.
4. Li_ elektis ŝi_ kiel mentorino_.
5. La gramatika_ libro_ kostas ok eŭro_.
6. La tria_ de majo_ mi_ veturos hejme_.

7.3 Kelkaj el la sekvaj frazoj, sed ne ĉiuj, estas gramatike malĝustaj. Kiu? Kial?

Substreku la malĝustan vorton, se estas, por marki la malĝustajn frazojn.

1. La knabino ne havas biciklo.
2. Ĉu vi jam lernis la poemeton?
3. Mankas al mi aeron.
4. Kiu ne prenis bonbono?
5. Nun mi havas tempon por vi.
6. Ili ne volis gustumi la dolĉa sukono.
7. Kie estas la skribilon?
8. Tie okazis grandan akcidenton.
9. La bebo havas nova lito.
10. Ne forgesu la akuzativon!

7.4 Vojpriskribo

Beschreibe einen Weg, den du häufig gehst, zum Beispiel zur Schule, zu einem Verein, zur Universität oder zur Arbeit. Versuche, dabei auch Partizipien zu verwenden, und benutze die Präpositionen

tra, trans, en, preter, ĉe, apud, super, el